

# Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Orgaan van de VLAAMSE ESPERANTISTENBOND, POSTBUS 100, MECHELEN  
Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschijnt maandelijks  
Een en twintigste jaarg.  
Nummer 5 (237)  
MEI 1954

Vertegenwoordiger in Nederland:  
L E E N  
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.  
postrek. 34563 van P. M. Mabeoone  
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

LIDGELDEN:  
\* Leden: 100 fr.  
\* Steunleden: min. 150 fr.  
Inwonende leden: 25 fr.  
(\* met bondsorgaan

ABONNEMENTEN:  
België: 75 fr.  
Ceteraj landoj: 75 bfr.  
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

## Beneluxa Esperanto Kongreso, Liego, Pentekosto 1954-a


Kvankam la aliĝiloj aldonitaj al la Aprila numero regule envenas, ni ree insistas por ke la kongresanoj kiel eble plej frue ensendu kaj faru la necesajn pagojn je la indikita poŝtekkonto. Ne hezitu kaj faciligu la laboron de la L.K.K.

Liego atendas vin ĉiujn. Gis baldaŭ!

— KONGRESKOMITATO — HONORAJ MEMBROJ —

S-roj: P. HARMEL, Eks-Ministro por Publika Instruado;

LIÈGE (BELGIQUE)



La Cité du Bon Accueil...

OFFICE de TOURISME  
PLACE S<sup>t</sup> LAMBERT ET GARE  
DES GUILLEMINS.

P. CLERDENT, Provincestro;  
F. GRUSELIN, urbestro de Liego;  
J. J. MERLOT, urbestro de Seraing;  
A. BUISSERET, senatano, eks-ministro;  
L. E. TROCLET, senatano, eks-ministro;  
O. PETRY, provinca estrarano;  
F. RENARD, provinca estrarano;  
M. DESTENAY, skabeno kaj deputito;  
la Skabenoj O. GILBART, M. DENIS, J. LEMAI-  
RE, Ch. BAILLY, J. ARETS, M. NOIRFALISE;  
J. WURTH, Konsulo de Luksemburgo;  
G. DEJARDIN, deputito;  
J. PIRMEZ, provinca prezidanto de la Belga Ruĝa  
Kruco;  
J. HENRION, prezidanto de Komerca kaj Indu-  
stria Ĉambro de Liego.

— LOKA KONGRESO KOMITATO —

Prezidanto: J. M. P. DESONAY.  
Vic-prezidantoj: D-ro T. VAN GINDERTAELEN kaj F.  
WEEKE.  
Sekretario: J. Soyeur, rue du Chêne, 91, Seraing.  
Kasistino: S-ino J. Plyson (p.ĉ.k. no. 1006.30).  
Festkomisaro: M. Guyot.  
Propaganda Fakoj: J. Koeune kaj J. Van der Meersch.

— EJOJ —

Akceptejo: Oficejo de Turismo, ĉe la elirejo de la stacido-  
mo LIEGE-GUILLEMINS.  
Kunsido: Hotelo VENITIEN, Place de la République  
Française (Teatro).  
Vesperfesto: Hotelo VENITIEN.  
Festeno: Vaxelaire-Claes, Place Maréchal Foch (100 m.  
de VENITIEN).  
Balo: Dancejo „BEAULIEU”, Place St-Paul) apud la  
Katedralo.  
Diservo por Katolikoj: Preĝejo St Sacrement, Boulevard  
d'Avroy, 132.  
Lunda Tagmanĝo: Societo „L'HARMONIE”, 6, Avenue  
Delchambre, HUY.

— PROGRAMO —

Sabaton, 5-an de junio 1954:  
13.30 h. Malfermo de la akceptejo, informejo kaj trans-  
dono de la kongresaj dokumentoj.  
16 h. Jarkunsido de Belga Esperanto-Instituto.  
17 h. Gvidata promenado tra la urbo.  
17 h. Laborkunsido R.B.L.E. — Ligestrarkunsido de  
F.L.L.E.  
20 h. Oficiala Malferma Kunsido de la Beneluxa Kon-  
Kongreso.  
21 h. Festvespero. (Legu plu p. 2)

## La 10-a T.E.J.O. — Kongreso (Hilversum)

La L.O.K. invitas ĉiujn junajn Esperantistojn, veni al nia Jubilea-Kongreso, kiu okazos de la 24a ĝis la 31a Julio.

Pagojn: Ned. Handel Mij., agentschap Hilversum, je la nomo S-ro J. Jorksveld.

### La kongresejo:

Restado, restoracio, amasloĝejo, granda salono por kunvenoj kaj festvesperoj en la Hilversumaj Sporthaloj.

Pri la provizora programo kelkajn detalojn:

**Sabato 24/7:** Solena inaŭguro de la kongreso.

Akcepto de la urba estraro en la Civitana Salono de la Hilversuma Urbodomo.

**Dimanĉon 25/7:** Protestantaj kaj katolikaj diservoj, publika propagando kunveno kaj grandstila Nederlanda festvespero.

**Lundon 26/7:** Jarkunsido de T.E.J.O. kaj Internacia Kabaredo-vespero.

**Mardon 27/7:** Tuttaga ekskurso, i.a. al Madurodam, Hago, Scheveningen, Rotterdamo k.t.p.

**Merkredon 28/7:** Ekskurso al Amsterdamo, vizito al la Hilversuma foiro kaj Kultura Vespero kun muziko, deklamo k.t.p.

**Ĵaŭdon 29/7:** Internacia Balvespero. Krome: Paroladkonkursoj, sporto. Ĉiutage la Parolata gazeto kaj verŝajne kongresbulteno.

La kostoj estas malaltaj: Por la tuta semajno, programo, ekskursoj, restado kaj manĝado en la kongresejo:

por T.E.J.O. membroj f 55.— (a por ne T.E.J.O. membroj f 60.— (b

Por la tuta semajno, kiel ĉi supre, sed ekskluzive dormado kaj matenmanĝo:

por T.E.J.O. membroj f 50.— (c por ne T.E.J.O. membroj f 55.— (d

Attentu: ĉe aliĝo post 15/5 '54 la prezoj, altiĝos per f 2,50.

Enskribigu vin kiel eble plej baldaŭ ĉe la Loka Organiza Komitato, Lobeliastraat 4, Hilversum, Nederlando.

## KELI konferenco en 1954

Tuj antaŭ la nunjara U.E.A. kongreso en Haarlem, Nederlando, KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA konferencos en la sama lando. De la 24-a de julio ĝis la 31-a de julio en Oosterbeek apud Arnhem.

Por akiri informojn pri kondiĉoj k.t.p. oni sia turnu al S-ro A. Storm, Goudsbloemstraat 13-c, Vlaardingen, Nederlando.

## Beneluksa Esperanto-Kongreso, Lieĝo.

(Komenco p. 1)

### Dimanĉon 6-an de junio:

9-a h. Diservo por Katolikoj (preĝejo St Sacrement, boulevard d'Avroy, no 132.) kun prediko de Abato MULLER, el St-Vith.

9.30 h. Malfermo de la akceptejo. — Fermo je 11 h. 30.

10 h. Solena kunsido R.B.L.E.

10 h. Jarkunsido Flandra Ligo.

12 h. Akcepto en la Urbodomo (Place du Marché).

13 h. Oficiala Fotografado (loko fikso).

13.30 Komuna Tagmanĝo (Magazeno VAXELAIRE-CLAES, Pl. Maréchal Foch).

15.30 Promenado tra la urbo. Vizito de muzeoj.

20 h. 30 Balo en „Beaulieu”, place St-Paul.

Jarkunsido de Flandra Esperanto-Instituto en „Hotelo Vénitien”.

### Lundon 7-an de junio.

9 h. Enŝipigo en boato „André-Lulu”, ĉe la ponto „Passerelle”. Vojaĝo al HUY, laŭ Ougrée, Seraing, Val-St-Lambert. Amay, Alveno en Huy ĉ. 12 h. 45.

13 h. Komuna tagmanĝo en salono de la societo „L'Harmonie”.

14 h. Vizito de la turisma urbo Huy.

ĉ. 17 h. Reiro fervoje al Lieĝo. (la horaro de la vagonaroj ankoraŭ ne estas fikso de la S.N.C.B.) — Disiro.

L.K.K.



## 39a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - HAARLEM

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando.

31-an julion - 7-an aŭguston 1954

Nro 7

OFICIALA KOMUNIKO

Aprilon 1954

### JAM PLI OL 2000 ALIĜINTOJ! L.K.K. NE PLU AKCEPTAS ALIĜOJN!

**Pagoj:** GRAVE! Malgraŭ avizoj kaj instrukcioj, homoj daŭre sendas ĉekojn el eksterlando sen la aldono de la makleroj de la Nederlanda banko (fl. 0.50). L.K.K. debetas la konton de la koncernaj pagintoj. Tio kaŭzos atendadon ĉe la kasgiĉeto en la kongresejo. Estus dezirinde, ke tiuj malgrandaj ŝuldoj estu likviditaj antaŭ la kongreso (eventuale per rpk. 1 rpk. — fl. 0.25).

**Ekskursoj:** Evidentas, ke multaj kongresanoj ne zorge legis la instrukciojn. La tuttagaj ekskursoj okazos en la sama tago: ĵaŭdon, 5-an de aŭg. La ĉiutagaj ekskursoj okazos nur lundon, mardon, merkredon kaj vendredon. Ni jam devis resendi plurajn mendilojn pro malĝustaj mendoj. Bonvolu ne skribi sur la mendilojn komunikojn nerilatajn.

**Loĝado:** Kelkaj mendintoj miskomprenis la instrukciojn. La makleroj guld. 2.50 estas por ĉiu mendo (= ĉiu persono). Multaj mendintoj supozas, ke estas avantaĝo sendi la mendilon senpere al Haarlem kaj la pagon al Peranto. Tiel ne estas. En tiaj kazoj la mendilo kuŝas ĝis avizo de la Peranto. Sendu la dokumentojn kaj la pagon ĉiam al la sama instanco. Bonvolu ne skribi apartajn komunikojn sur la mendilon!

**Libroservo:** Dum la kongreso funkcios Libroservo en kiu havas solvendrajton la libroservo de L.E.E.N. (S-ino S. Mabesoone-Visser, 122 Pythagorasstraat, Amsterdam-O). Eldonistoj, kiuj havas intereson vendi siajn librojn dum la U.K. bonvolu kiel eble plej baldaŭ aranĝi la aferon.

Statistiko (ĝis 31 marto): Algerio 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 9, Belgujo 52, Brazilio 3, Britujo 272, Danujo 64, Finnlando 38, Francujo 227, Germanujo 205, Hispanujo 11, Indonezio 1, Irlando 4, Italujo 73, Japanujo 1, Jugoslavio 75, Kanado 4, Madejro 1, Meksikio 2, Nederlando 550, Norvegujo 109, Novzelando 12, Portugalujo 7, Svedujo 241, Svislando 26, Turkujo 2, Usono 8. Sumo el 27 landoj: 2000 (pasintjare 960).

Mason Stuttard,

Konstanta Kongresa Sekretario

# LA STUDANTO

Jen la vortoj, kiujn oni metu sur la lokojn, kie estas la streketoj en

## Ekzerco 15 A

1: Kiam... tiam... 2: Kiam. 3: ...se mi tiam. 4: Se... tiam. 5: Kiam. 6: ...se... tiam. 7: Kiam. 8: tiam..., tiam. 9: Kiam. 10: Kiam. 11: Tiam..., Se...

len la 5 frazoj de ekzerco 13 B kun res-

dis K. en la p. 3: Hierau mi eĉ vidis K. en la p. (Mi ne nur aŭdis, sed eĉ vidis lin, do mi estas certa, ke li estis tie). 4: Hierau mi vidis eĉ Karlon en la p. (Mi tute ne atendis lin tie, ĉar mi scias, ke li estas tre okupita kaj tute ne interesita de la parko). 5: Hierau mi vidis K. eĉ en la parko. (Mi vidis lin en pluraj lokoj, eĉ en la parko, kie mi tute ne atendis lin.)

tio maldorlot—is unu la alian."

7: „Do ili jaluz—is. Kiam sanĝ—is tiu malagrabra situacio?"

8: „Kiam ni pliaĝ—is, ni plisaĝ—is. Trijar—inte, mi enlit—is inter ambaŭ: la milito far—is ni lito."

## Ekzerco 15 B:

Kie estas streketo, tien metu la ĝustan prepozicion (= voorzetsel):

1: Mi iris paciento — malsanulejo proksime — la urbdomo, sed malproksime — nia hejmo. 2: Li suferis — hepatmalsano, sed esperis — baldaŭa resaniĝo. 3: La kuracisto unue pensis — operacio sed — la malforteco de la paciento ne insistis — ĝi; — tago — tago malplialtiĝis la temperaturo. 4: Ĉiu — timo — la operacio? 5: — peto de la paciento mi alportis — li surtuton. 6: La ĉeflegistino miris — tiu alporto kaj konsilis — mi reporti la surtuton. 7: — la kuracisto la paciento devis ne veni — sia lito. 8: La paciento diris — la flegistino: „Nun mi suferas — helpatmalsano." Ekzercojn korrektajn sendu antaŭ la 10-a de majo 1954. la flandraj Esperantistoj al V.E.B., „La Studanto", postbus 100, Mechelen; nederlandaj al S. S. de Jong Dzn., Waltaweg 3, Tjerkerwerd (Frislando).

## PRINTEMPO EN LA DOMO PER LIBRO POR ĈIU HOMO

	gld.	fr.
<i>La Alia Pasinteco (Bulthuis)</i>	bind. 4,90	70,—
<i>Anstataŭa Edzino (Maxwell)</i>	bind. 3,—	40,—
<i>Vagabondo kaj Sinjorino (Kloepffer)</i>	bind. 3,—	40,—
<i>Al Torento (Engholm)</i>	1,60	20,—
<i>Bugatlaro (Rosbach)</i>	4,—	
<i>Alaska Stafeto (Omelka)</i>	bind. 3,25	45,—
<i>Morto de Trajno (Crofts) detektiva romano</i>	bind. 5,30	65,—
<i>La Lanternisto (Sinkiewicz)</i>	bind. 2,90	40,—
<i>Kredu min Sinjorino (Rosetti)</i>	bind. 5,40	72,—
<i>Miru, Pensu, Ridu (Benneman)</i>	bind. 5,40	72,—
<i>Brulanta Sekreto (Zweig)</i>	2,35	30,—
<i>Fabeloj III (Andersen)</i>	2,30	30,—
<i>La mondo ne havas atendejon (Dekker)</i>	2,50	34,—
<i>Esperanta Krestomatiko</i>	bind. 1,95	24,—
<i>La Skulptaĵoj sur la Vigeland-ponto, 46 fotoj esperanta - franca teksto</i>	4,—	55,—
<i>Misteroj de Vivo (Bögh-Högsted)</i>	2,50	
<i>Deveno kaj Vivo de Esperanto (Stojan)</i>	2,25	30,—
<i>Vortoj kaj Esprimoj por Komencantoj (Zondervan)</i>	1,15	15,50
<i>Hoe kan ik het in Esperanto zeggen?</i>		
(Buijs & Faulhaber)	0,25	5,—
<i>Victoria (Hamsun)</i>	1,40	22,—
<i>Prozo (de Danaĵ kaj Norvegaj aŭtoroj)</i>	0,90	12,50
<i>Eigennamen in Esperanto (Degenkamp)</i>	0,35	5,—
<i>La Princo kaj Betty (Wodehouse)</i>	1,20	16,—
<i>La Tempo-Maŝino: Lando de la Blinduloj (Wells)</i>	1,20	16,—
<i>Pro Iŝtar (Luyken)</i>	bind. 5,50	65,—

## MENDU ĈE:

Libro-Servo LEEN, Pythagorasstraat 122, Amsterdam (Postrek. 76915)  
Flandra Esperanto Instituto, Blankenbergse Stwg. 72, BRUGGE (p.k.r. 3268.51)

## PERESPERANTA VOJAĜO DE N.R.V. TRA DANUJO

Ci tiun jaron la „Nederlandsche Reisereniging" okazigos peresperantan vojaĝon por siaj anoj - kaj por anigontaj geesperantistoj - por konstati la eblecojn de Esperanto sur la tereno de la turismo.

La programo estas ege alloga kaj farita interkonsente kun delegito de la Centra Dana Ligo Esperantista. Oni vizitos per luksa aŭtobuso, Jutlandon, la insulon Fünen, Selandon kaj transiros eĉ al Svedujo, kie la fervoraj gesamideanoj el Malmö akceptos kaj gvidos la partoprenantojn. Cetere, ĉiuloke la samideanoj prizorgos ian programon kaj havigos gvidonton por la vizitado de la koncerna regiono. Ĉio estas tiel planita, ke la sukceso estu impona kaj ke ĝi instigu la grandan vojaĝunuigon NRV estonte dediĉi sisteman atenton al la eblecoj de Esperanto.

La vojaĝo, okazonta de la 14-a ĝis la 24-a de Julio, estos gvidata de s-ro S. Pragano. Interesigantoj petu senprokraste detalan cirkuleron de la N.R.V., Zeestraat 100, Den Haag. La nombro de partoprenantoj estas limigita je 35 interkonsente kun la CDEL, kies anoj estos, parte, niaj gastigantoj.

pektive la vortoj „ankaŭ" kaj „eĉ" kaj la interkrampaj konkludoj kiel

## Ekzerco 14 B:

1: Ankaŭ hieraŭ mi vidis Karlon en la parko. (Preskaŭ ĉiutage mi vidas lin, ankaŭ hieraŭ). 2: Hieraŭ ankaŭ mi vidis K. en la parko. (Pluraj personoj vidis lin, ankaŭ mi). 3: Hieraŭ mi ankaŭ vidis K. en la p. (Mi ne nur aŭdis lin). 4: Hieraŭ mi vidis ankaŭ K. en la p. (inter aŭ krom aliaj personoj ankaŭ K.) 5: Hieraŭ mi vidis K. ankaŭ en la parko. (Ne nur en lia oficejo kaj sur la strato, sed ankaŭ en la parko). 1: Eĉ hieraŭ (kvankam tiam ege pluvus) mi vidis K. en la parko. 2: Hieraŭ eĉ mi (kvankam mi ne estas tre rimarkema) vi-

## NOVAJ EKZERCOJ

### Ekzerco 16 A:

Kie estas streketo, tien metu la sufikson -ig-, -iĝ- aŭ ..... nenion:

1: „Kiam vi nask—is?" demand—is s-ro Sci-volulo sian amikon.

2: „Mia patrino nask—is min, kiam komenc—is la unua mondmilito," ekrespond—is la amiko.

3: „Ĉu ekplod—is la milito pro via nask—o"? daŭr—is S. la demandadon.

4: „Mi dub—as, sed mia nask—o en nia hejmo kaŭz—is militeton, almenaŭ malpac—on."

5: „Kiuĵ malpac—is?" inform—is S.

6: „Miaj du pli frue nask—intaj fratinoj ambaŭ vol—is dorlot—i min kaj pro

**NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”**

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:  
 Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.  
 Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.  
 Boekendienst: S. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915,  
 Schr. cursus voor gevorderden: H. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.  
 Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.  
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.  
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm. Mej H. M. Mulder, Zilvermewuustr. 29 Badhoevedorp  
 Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.  
 Vic-ĉefd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 22075.

**KOMUNIKOJ  
DE LA ĈEFESTRARO**

Laŭ decido de nia jarkunveno „Nederlanda Esperantisto” de nun aperos je la duono de la ĝisnuna formato kun duobla paĝonombro. Kvankam laŭ propaganda vidpunkto la granda formato eble estis preferinda, tiuj kiuj kutimas konservi la jarkolektojn, por se necese konsulti jam aperintajn numerojn, certe pli ŝatos la novan formaton. Ni esperas, ke en sia nova vesto „Nederlanda Esperantisto” estos al niaj membroj bonvena gasto, same kiel antaŭe!

La ĝen. kasisto petas la ĝen. anojn pagi la jarkotizon (g.4,25; por samhejmanoj kaj junuloj g. 2,25) kaj la abonantojn pagi la abonmonon (g. 2,75) por la nuna jaro. La sekcioj, kiuj abonis nian gazeton por publikaj legejoj, bonvolu pagi g. 1,—. Post la 15-a de majo la kasisto dissendos poŝtkvitancojn al tiuj kiuj ankoraŭ ne pagis. Se vi do deziras eviti ekstrajn elspezojn pro la enkasigo, vi nepre pagu antaŭ la 15-a de majo per poŝtkonto 34563 de Ned. Esp. Veren. LEEN, A'dam.

La kongresa komitato petas tiujn sekciojn, kiuj disponas pri flago aŭ standardo, prunti ilin al s-ro E. de Wolf, Breukstraat 18, Haarlem. Se vi mem ankoraŭ bezonas la flagojn, vi tamen nepre sendu ilin al Haarlem antaŭ la 15-a de julio, sed jam nun informu s-ron E. de Wolf pri la formato kaj nombro, por ke L.K.K. sciu, pri kiom da flagoj ĝi povos disponi dum la kongreso.

Al ĉiuj, kiuj deklaris sin pretaj iel helpi dum la kongreso, L.K.K. jam nun esprimas sian koran dankon.—

En la antaŭa numero troviĝis aliĝilo por la Beneluksa en Luik. Kvankam ni pro la Universala Kongreso en Haarlem ne aranĝos propran kongreson, ni tamen esperas, ke pluraj anoj niaj dum Pentekosto partoprenos la kongreson en Luik. Detaloj pri la programo jam aperis kaj ankoraŭ aperos en nia organo.

*La 3-a disaŭdigo de radio A.V.R.O. pri Esperanto okazos lundon la 17-an de majo en la „Globe-programo”. Temo: Esperanto kaj literaturo.*

**RAPORTO pri la JARKUNVENO****la 4-an de aprilo en Amersfoort**

Je la 10.30 h. la prezidanto, s-ro H. J. Blokker, malfermas la kunvenon, esprimante sian ĝojon pri la ĉeesto ne nur de la delegitoj sed ankaŭ de pluraj interesiĝantoj en kunveno, kiu malhavas la festan kadron de kongreso. Speciale li bonvenigas la delegitojn de niaj novaj sekcioj en Winschoten kaj Rotterdam. La ĉeesto de delegitoj de malproksikaj sekcioj (Treebeek, Winschoten) estas imitinda ekzemplo por kelkaj proksimaj sekcioj, kiuj ne sendis reprezentanton.

Parolante pri ĉeestantoj kaj neĉeestantoj li memorigas pri tiuj, kiuj forpasis en la lasta jaro, s-ino A. de Waard, f-ino A. de Haas, f-ino P. Cremer, s-ro Blankensteijn kaj s-ro Tichon. Per unuminuta silento la kunveno honoras tiujn kunlaborintojn, kies laboro restos vivanta en nia movado.

El la raportoj de la sekretario kaj kasisto, aperintaj en „Nederlanda Esperantisto”, ni povas konstati, ke la situacio de L.E.E.N. estas sana. Multaj novaj anoj aliĝis, sed bedaŭrinde la nombro da ekziĝoj grandparte nuligas tiun kreskon. La ĉefestraro havas la impreson, ke la sekcioj ne sufiĉe klopodas por reteni la ekziĝantojn kaj faras malmulton por konservi la kontakton kun la ekziĝintaj membroj. Nur kelkaj sekcioj ekz. mendis la formularojn, kiujn la ĉefestraro senpage disponigas al la sekcioj por revarbi la ekziĝintojn. Se ni povus konsiderinde pligrandigi la membronombron, nia financa stato estus pli bona. Nun la kasisto devas lerte manovri por ekvilibrigi la en- kaj elspezojn. Feliĉe ni en la pasinta jaro povis ĉerpi 250 g. el la profito de la libroservo. Ĝojige estas, ke en la lastaj jaroj koordinataj kursoj de la populuniversitatoj en diversaj urboj montriĝis sukcesplenaj. Ankaŭ skribaj en diversaj gazetoj altiris multajn lernantojn.

La nuna jaro estas por nia movado estereordinare grava pro la 39-a Universala Kongreso en Haarlem. La interesiĝo por tiu kongreso montriĝis tiel granda, ke jam kvar monatojn antaŭ ĝia komenciĝo la lima nombro por la aliĝoj estas atingita. La kongreso estas valora ankaŭ por la ĝenerala pro-

pagando kaj la gazetaro montras kreskantan interesiĝon. Ĝojige estas, ke ankaŭ A.V.R.O. nun disponigas tempon por Esperanto. La kreskanta interesiĝo pri nia afero kompreneble vekas reagojn ĉe tiuj, kiuj malamike rilatas al nia lingvo. De tempo al tempo aperas artikoloj kontraŭ Esperanto en la gazetaro, kiuj tamen ne povas malutili al nia movado kaj neintencas la kontraŭuloj de Esperanto eĉ propagandas nian lingvon, me-tante ĝin en la publikan atenton.

Finante sian malferman alparolon la prezidanto dankas s-inon G. Salomons-Ruardi, kiu bonvolis fari la necesajn aranĝojn por la salonludo kaj petas la ĉeestantojn kanti la L.E.E.N.-himnon antaŭ ol komenci la pritrakton de la organizaj aferoj.

La ĝen. sekretario sciigas, ke reprezentitaj estas 25 el la 32 sekcioj kun entute 41 voĉoj. Li laŭtegas leteron de A.N.P., kiu sendis jurnaliston al la jarkunveno por raportoj por la gazetaro. Nomo de L.K.K. li petas la delegitojn noti en siaj sekcioj la nomojn de membroj, kiuj estas pretaj kunlabori dum la Haarlem'a kongreso. Entute L.K.K. bezonas proksimume 150 helpantojn. Kelkaj sekcioj (Amsterdam, Groningen, Haarlem) jam donis laŭdindan ekzemplon sed kontraŭe la kunlaboro de kelkaj aliaj grandaj sekcioj lasas multon por deziri. Montriĝas, ke kelkaj sekcioj ankoraŭ ne pagis la kotizon por la unua duonjaro kaj ne havas voĉdondrajton: la kunveno aprobas, ke ankaŭ la delegitoj de tiuj sekcioj rajtas voĉdoni.

La jarraportoj de la ĝen. sekretario kaj tiuj de la biblioteko kaj ĝiaj kontrolintoj estas aprobataj.

Aldone al la raporto de la propaganda servo s-ro H. Bakker diras, ke li ricevis plurajn petojn refuti argumentojn de kontraŭuloj per publika respondo al artikoloj malfavoraj al Esperanto. Li tamen konsilas eviti polemikojn, kiuj neniel utilas, kaj fari konstruan laboron. De la departemento li akiris la permeson, pendigi afiŝojn en oficialaj konstruaĵoj kaj jam en 228 ejoj pendas la afiŝo de N.C.K.E. Lia raporto estas aprobatata. Pri la gazetarservo raportis s-ro H. Oosthoek. Laŭ ricevitaj informoj, pro nesufiĉa kunlaboro de kelkaj sekcioj kaj ĝen. anoj certe ne kompletaj, aperis 384 artikoloj en 97 gazetoj, inter kiuj la gravaj jurnaloj „Handelsblad”, „Parool”, „Vrije Volk”, „Telegraaf”, „Trouw”, „Nieuwe Rotterdammer” k.a. Li petas ke oni, sendante gazetteltranĉaĵojn, klare indiku la aperlokon kaj la daton. S-ro R. Kuiper (Enschede) demandas, ĉu la sekcioj povas ricevi liston de la gazetoj, kiuj regule aperigas Esp.-novaĵojn. La prezidanto atentigas, ke la listo ne estas kompleta kaj atentigas ĉiujn sekciojn pri la graveco de la gazetarservo. S-ro S. Pragano opinias, ke tia listo ne imponos la redakciojn. Li sugestas sendi cirkuleron kun konsiloj al la sekcioj kaj instigas

(Legu plu p. 5)

## JARRAPORTO 1953

Karakterizi la tutan jaron 1953 per unu sola vorto ne estas malfacile: KUNLABORO! Por la jaro 1948 ni jam povis diri la samon, sed tiam estis kunlaboro kun la Nederlanda Esperanto-asocio, kiam en 1953 temis pri la Pentekosta kongreso, aranĝita inter la du enlandaj ligoj kaj LEEN. Aliflanke fondiĝis la 14.11.1953 la Belga Centra Komitato Esperantista, denove inter la du enlandaj ligoj. Kaj tie ellaboriĝis la intertempe efektivigita komuna eldono de la revuoj; al tiu aranĝo aliĝis ankaŭ la Svisa Esperanto-asocio.

Pri la Beneluksa kongreso aperis e-  
lokventa raporto en la junia numero de Flandra Esperantisto, kies nomo je tiu okazo estis ŝanĝita en „Beneluksa Esperantisto”.

Pri la BCKE aperis raporto en la decembra numero de F.E.

Restas kelkaj klarigoj pri la komuna eldono de la gazetoj de Flandra

## Raporto Jarkunveno LEEN

(Daŭrigo)

al persona kontakto kun redaktoroj. S-ro H. Oosthoek donas ankoraŭ kelkajn klarigojn pri la funkciado de la servo al la delegito de sekcio Alkmaar. Lia raporto estas aprobata.

Rilate la teatran servon s-ro A. J. Kalma denove petas la sekciojn sendi prunte taŭgan materialon por kopiado. Ankaŭ nederlandlingvaj skeĉoj estas bonvenaj. Lia raporto estas aprobata.

La jarraportoj de la ĝen. kasisto kaj de la kaskontrolintoj estas senkritike aprobataj.

S-ro J. Telling, la ĉefdelegito de U.E.A., raportas pri la stato de tiu asocio en nia lando. Fine de la jaro 1953 U.E.A. havis en Nederlando 428 membrojn, el kiuj 26 ne daŭrigis la membrecon en 1954. Malgraŭ tiuj ekŝiĝoj la membronombro nun estas 442 kaj verŝajne tiu nombro ankoraŭ iom kreskos. La vizito de s-ro C. C. Goldsmith favore efikis. Pligrandigo de la delegita reto estas programpunkto plenumenda. La raporto estas aprobata.

Neniu anoncis sin por kritiki la gvidadon de la ĉefestraro kaj la redaktadon de „Nederlanda Esperantisto”. Ĉu el tio ni konkludu, ke la koncernaj funkciuloj modele laboris? Ni esperu, ke la mankon de kritiko ne kaŭzis la malaktiveco de la sekcioj! Nome de s-ro S. S. de Jong, la gvidanto de la studrubriko, kiu kutime ricevas nur malmultajn tradukojn por korekti, la ĝen. sekretario enketas pri la interesiĝo pri tiu rubriko. Montriĝas, ke pluraj sekcioj uzas la materialon de tiu rubriko en siaj kunvenoj kaj nepre deziras ĝian daŭrigon.

(finota)

## Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 100, Mechelen

Prezidanto : Gerard Delrouwere, Magdalenastraat 29, Kortrijk.

Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).

Kasistino : F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.

Biblioteko : E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)

U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.

Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen (tel. 136.77)

Koresponda kurso: A. Nysstraat 37, Anderlecht

Ligo Esperantista, La Estonto Estas Nia, Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj Svisa Esperanto-asocio. Niaj membroj certe ankoraŭ memoras la kialojn kiujn ni antaŭmetis okaze de la komuna eldono kun LEEN. Nia membronombro estis tia ke ni ne plu kapablus elspezi monon por la informado pri Esperanto en nia lando, sed ke ĉiuj kotizoj nur estis destinitaj por la kostoj de Flandra Esperantisto. Tio ne estis sana metodo; aliflanke la gazeto de niaj nordaj samideanoj ne estis laŭ aspekto inda por tia organizo kiel LEEN. La kunlaboro ebligis la daŭrigon de Flandra Esperantisto, kaj la plibonigon de Nederlanda Esperantisto. Tamen ni ambaŭ devis cedi iom da loko al alia organizo, kaj ofte la enhavo ne estis tute konvena por niaj legantoj, aŭ ĝi foje ne plaĉis al la LEEN-anoj. Tamen ni spertis ke multaj artikoloj kaj sciigoj havis komunan intereson kaj ĝuste tiun fakton pensigis nin. La samaj sciigoj kaj eĉ la samaj artikoloj aperas tiom da fojoj en ĉiuj landaj revuoj; kaj ofte interesa artikolo ne estas ĝenerale konata, pro la fakto ke ĝi aperis en nacia gazeto kun malgranda eldonkvanto.

El tio ni konkludis ke tute komuna gazeto ne estas la idealo, sed ke gazeto kun kelkaj komunaj paĝoj kaj kelkaj apartaj, profitigas kaj la eldonanton kaj la legantaron.

Ni esperas ke per la kunlaboro inter la kvar jam nomitaj asocioj, ni fine ankaŭ por la gazetoj de LEEN kaj F.I.L.E. povas apliki la sistemon de kelkaj komunaj paĝoj, kaj unu aŭ du tute apartaj kun propraj sciigoj kaj artikoloj.

La interna vivo pasis kiel kutime, kvankam la membro-nombro iom plialtiĝis. Precipe de sekcioj Antwerpen, Brugge, Gent kaj Mechelen ni ricevis vivosignojn. Sekcio Brugge aranĝis en la urba teatro imponan koncertvesperon kun la tre konata orkestro "The Ramblers"; pli ol 700 personoj ĉeestis.

En la sekvantaj punktoj mi pritraktas la diversajn fakojn de la Ligo.

UEA: Nia peranto sciigis ke la nombro de la aliĝintoj pere de li atingis en 1953 la plej altan ciferon. En la

jarlibro aperis tutpaĝa anonco de la urbo GENT kaj kvar hotelaj anoncoj. F.E.I. denove reklamis per alloga anonceto.

FLANDRA ESPERANTISTO: redaktita dum la tuta jaro de S-ro D-ro Van Gindertaelen; ĝi aperis 11 fojojn kun eldonkvanto de 500.

BIBLIOTEKO: interkonsente kun LEEN la liganoj povas legi la librojn de la LEEN-biblioteko, kondiĉe ke ili pagu la afrankon por la resendo.

KORESPONDA KURSO: funkciis dum la tuta jaro; kelkaj kursanoj post la kurso membriĝis.

KUNVENOJ: okazis du ĝeneralaj kunvenoj (Antwerpen kaj Gent) kaj kvar estrarkunvenoj; krome unu kunveno de la Centra Belga Komitato.

Ni konkludas ke en la Ligo la rutinaj agoj daŭris preskaŭ senriproĉe, sed ke la iniciato kaj la vigleco de la membraro stagnis. La samon ni ne povas diri de la estraro kaj precipe de kelkaj estraranoj kiuj preparis kaj efektivigis la supre menciitajn kunlaboradojn.

Maertens G.

Sekretario.

## POSTKONGRESA NUMERO

aperos cirkaŭ la 15-a julio, por ke ni povu ankoraŭ enmeti la kongresraporton. Kiel kutime, ni ne eldonos aŭgustan numeron.

L.E.E.N.

F.I.L.E.

## KONGRESO EN LIEGO

Nun urĝas via aliĝo! La aliĝilo troviĝis en la aprila numero.

Se vi havas proponojn pritraktotajn dum la jarkunsido, bonvolu tuj skribi al la sekretario.

## PREMIOJ al ENLOGANTAJ MEMBROJ

1a S-ino H. Roose-De Kersgieter.  
2a F-ino N. Van Gindertaelen.  
3a S-ino M. Volders-Van der Mast.

## 3a LISTO de SUBTENANTOJ

Sro Ed. Symoens (Kongo) 150 Fr.

## Bibliografio

D-ro PAUL NEERGAARD: Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj kaj kiel prilukti ilin, eldonita de „The Esperanto Publishing Company Ltd”, Rickmansworth, Anglujo, 1954. 234 p., 75 fig. kaj 9 koloraj bildpaĝoj (\*). Prezo: 11 guld. Aĉetebla ĉe la Libro-Servoj.

La libroj esperantaj en certa grado estas la vestoj de nia movado: ili montras al la ekstera mondo la staton de la esperantismo. Ili ja pruvas ke ekzistas publiko kiu aĉetas tiajn librojn, kiu ŝatas ilian laŭnhavan kaj laŭspektan valorojn. La libro „Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj” estas unu el tiuj libroj, kiujn oni fiere povas montri, ĉar ĝia enhavo el scienca vidpunkto estas elstare bona kaj ĝia aperaĵo estas unuaranga: preso, ilustrado, bindo kaj papero. „Esperanto Publishing Company” meritas gratulon pro tia eldonaĵo, kiu parte estas kleriga libro pri la plantpatologio, parte konsultlibro por hortikulturistoj kaj ĝardenamatoroj. Tiaj verkoj maloftas en Esperantio. Ĝia eldonaĵo estas pli malpli eksperimento: Ni esperas ke la aĉetemo de la esperantistaro estos nedubebla stimulo al la eldonaĵo daŭrigi la aperigon de tiaj libroj.

En la antaŭparolo la aŭtoro mencias, ke la verkado havas du celojn: „parte prezenti enkondukon en la sciencan, kiun la libro pritraktas, parte kulturi novan kampon faklingvan en Esperanto, do certgrade konsistigi terminaron”. Plue sed tio ne estas dirita en la libro — la eldono povus prezenti al la neesperanta mondo moderna konsultlibron, kiun valoras eklerni esperanton. En tiuj landoj, kie tia libro mankas, la fakaj kvalitoj de la libro valoras akiri la legokapablon pri esperanto. Kolegoj recenzantoj do recenzu ankaŭ en neesperantaj fakgazetoj!

La esperantistoj ĝuas la bonŝancon havi inter si specialiston kiel NEERGAARD kun mondfama reputacio kiu enkorpiĝis sian grandegan sperton kaj scion kaj multe de sia tempo en la ĉi preparolata verko. Ĉu tio signifas enfermo de scio kaj peno internen de la limoj de nia lingvo aŭ male, la plej efika utiligo sekve de la mondvasteco de Esperanto, dependas de ni, esperantistoj. Oni sentas, ke ni havas en niaj manoj la respondon al tiu demando, kiu povas esti decida koncerne eldonadon de faklibroj en la estonteco. Ĝi devigas nin diskonigi la libron kiom eble plej multe.

En diversaj klare verkitaj ĉapitroj ĝenerala informo estas donata pri la baza sciigo kaj penslinioj de la scienco de plantmalsanoj. Tiuj ĉapitroj estas interesaj kaj instruaj por ĉiu, kiu ŝatas havi superrigardon pri la moder-

na scienco, kiu estas tiel grava por la hortikulturo kaj por la produktado de fruktoj, legomoj kaj floroj. Aliaj ĉapitroj estas speciale verkitaj por la praktikisto, ĉu la profesia ĝardenisto, ĉu la amatora ĝardenposedanto. Ili donas ĉian helpon ĉe la rekonado de la simptomoj de malsanoj kaj parazitaj atakoj al la plantoj. Ili ankaŭ donas ĉian necesan informon por efike batali la mankojn aŭ difektantojn. Multe de tiu informo estas prezentita en lertaj kaj supervideblaj tabeloj.

Oni povas diri, ke ĉiuj facetoj de la

komplikita materio estas detale pritraktita. La priskriboj de malsanoj kaj simptomoj estas koncizaj kaj klaraj ankaŭ dank'al multaj bonaj fotoilustraĵoj kaj bele reproduktitaj koloraj bildoj, kiuj lastaj estas kunigitaj sur 9 elfaldeblaj folioj.

La lingvaĵo estas kiel oni povas atendi de membro de nia Akademio. En la titolo de la libro la uzo de „al” anstataŭ „kontraŭ” miaopinie estas preferinda kaj pli klara. (Atakoj al ĝardenplantoj). Estas kompreneble ke pritrakto de specialisto fako postulas multajn fakterminojn, kiuj ankoraŭ mankis en Esperanto. Ke Neergaard elektis por plantoj, parazitaj kaj malsanaspektoj prefere tradukitajn, do esperantigitajn nomojn aŭ anglajn estas ĝojiga kaj montras kiom vigle vivas Esperanto. Ringoŝpinulo, saks-porfungo, pirvespo, pokalrusto, hajl-trua malsano, folipulo estas nur kelkaj ekzemploj. Tamen transpeno de neologismoj el la scienca ĵargono estis necesa. Ĉiuj fakterminoj estas klare difinitaj kaj en la teksto kaj en la terminara listo en la lasta ĉapitro. Kritiki la enkondukon de nova fakterminoj estas malfacile, ĉar nur la verkanta specialisto scias ĉiujn motivojn por tio. Tamen mi kuraĝas dubi, ĉu esperanto vere bezonas terminojn kiajn „masklo” kaj „femalo” por vira kaj ina vivajo, „ŝoso” por vergosimila branĉo, „sporangio” por sporujo, „suscepto” por mastroplanto kaj „susceptema” por infektibla, senrezista.

Konklude: ĉi tiu libro estas elstara gajno por nia fakliteraturo kaj oni miras pri la relative malalta prezo por tia belaspekta kaj riĉe ilustrita verko.

G. F. Makkink.

(\*) La libro parolas pri koloritaj „tabuloj”, kio ŝajnas al mi ne-rekomendinda vorto por bildpaĝo.

PASKO. La Mondsavanto kaj la Homaro, de Martinus. El la Dana C. Graversen. Eldonis: E. Sekcio de Spirit-Scienca Instituto de Martinus, Kopenhago 1954 — P. 80 — Recenzota.

## SVEDA SOMERA SEMAJNO

### Kompleta Programo

Sveda Esperanto-Instituto invitas al nova prelegsemaĵo en 1954. Ĝi okazos 8—15 aŭg. en **Frostavallen**, Höör, Svedujo tuj post la grandaj kongresoj. Frostavallen situas en la suda parto de Svedujo. La nombro de la partoprenantoj estas limigita. Informojn oni petu ĉe s-ro Jan Strönné, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo.

SSS ĉijare prezentos jenajn prelegojn:

Prof. Ivo Lapenna, Jugoslavio „La Eŭropa Konsilantaro kaj la Ideo de Eŭropa Federacio”.

- La plej nova historio de Eŭropo
- La nuna ekonomia kaj politika situacio en Eŭropo
- La ideo de Eŭropa Federacio
- La organizo de la Eŭropa Konsilantaro
- La demando de la Internacia Lingvo antaŭ UNESKO.

Docento S. Pragano, Nederlando „Kulturaj perloj el la originala Esperanto-literaturo”.

- La polaj klasikuloj
- La majstroj de la budapeŝta skolo I
- La majstroj de la budapeŝta skolo II
- Pariza sprito
- Diverslanda panoramo.

D-ro F. Szilágyi, Svedujo „Spertoj, komparoj kaj instruoj”.

- Komparo de la ekonomiaj kondiĉoj en diversaj landoj
- La psiko de diversaj popoloj
- Diferenco de lingvoj kaj precipe lingvaj kutimoj
- La situacio de virinoj en diversaj landoj en la vivo, en la laboro kaj en la familio
- Komparo de la kultura vivo kaj konceptoj.

Licenciat Tibor Sekelj, Kostariko „Mezamerika kulturo”.

- La alta kulturo de la Maja-indianoj (lumbildoj)
- La imperio de la inkaoj
- Unu jaron kun la sovaĝaj triboj de Amazonio (lumbildoj)
- Promeno tra Mezameriko kaj Meksikio (lumbildoj)
- Grimpado al la monto Akonkagvo (filmo).

Krom la prelegoj okazos ekskursoj, internacia kabaredo, balo, distraĵoj ktp.

Subvencio por la veturkosto havebla.

## LA LITERATURA RAPORTAĴO de Stijn Streuvels.

(Kun afabla traduk-kaj prespermeso de la aŭtoro, el la flandra: *Hedero.*)

Alia tempo, aliaj moroj.

Antaŭe oni lasis Artistojn, Skulptistojn, Pentristojn, Poetojn kaj Verkistojn al ilia verkado.

Ĉiu kiu okupiĝis pri arto, penadis en la kvieto, izolite, kaŝite, sola. La popolo ricevis la produktojn de ilia arto; — kiel bakisto liveras la panon laŭ ĝi forlasas la fornon, por satigi ĉiun malsatanton, tiel artistoj liveris la spiritan panon al ĉiu, kiu anime malsatis. Ja neniam okazis ke tia spirita bakisto forlasis sian knedujon kaj laŭtigis antaŭ la popolo la voĉon por paroli... pri si mem kaj pri sia arto.

La tempo ŝanĝiĝis; nun la publikon ne plu kontentigas la produktoj, solaj, de la artisto; ĝi volas la artiston mem. La publiko ja ankoraŭ ne volas kredi ke la artisto estas homo kia alia, homo kiu, kun denaska talento, pliigas tiun talenton en iun direkton kaj pri-traktas belajojn, kiel forĝisto prilaboras feron, ĉarpentisto lignon. Ankoraŭ ĉiam la homoj vidas en tio ioman magion kaj, kiel pri ĉio kie intervenas mistero, ili volas funde ekscii kiel skulptisto hakas siajn bildojn, pentristo pentras siajn pentraĵojn kaj poeto verkas siajn versojn. Centfoje oni jam diris kaj ripetis: ke ĉiu spirita laboro okazas interne. Sed ĉe internaj aferoj nenio estas videbla kaj tial la homoj ja ne volas kredi tion, ne konsentas kaj ĉar, ĉe la interna, la vera spiritalaboro oni vidas nenion kaj oni povas pri ĝi malmulte rakonti — tial la publiko interesiĝas pri flankaj, pri kio ĉirkaŭas la metion, pri la manieroj, la kutimoj, agoj kaj faroj de la artisto, pri la artisto mem. Kie la publiko ne povas penetri, tie ĝin bonege helpas la literatura raportaĵo.

Antaŭe la kritiko ekzistis nur por la artisto. La rolo de la kritiko servis por konsciigi la artiston pri si mem; estis io ekskluzive propra al la fako, kaj tio interesis nenium eksterstaranton. Pro la granda disvastiĝo de la revuoj, kiuj ampleksas ĉiujn artojn kaj kie oni precipe trovas studojn pri artaĵoj kaj artistoj, la kritiko nun, hodiaŭ, direktas sin al la publiko pli ol al la artistoj. La prijuĝanto precipe ŝatas unualoke reliefigi sian propran spiriton — li devas montri ke li per unu konsidero, per supra enrigardo (ĉar pli da tempo tiu aktivulo ne povas dediĉi al tio) scias pri tio pli ol la artisto mem. Estas li kiu diras kiel devas esti kaj kiel ne povas esti. Estas li kiu *scias*, esploras la kaŝitajn liniojn malantaŭ la verko, kiu spionas malantaŭ la kulisojn... kaj eldiras siajn verdiktojn per la necesa forto, propra al lia alstara ofico. Tiuj prijuĝoj — kiuj estas pli rekomendoj kaj malaprobaj, kiujn la aĉetanto eble profitu -- ne povas esti tro sekaj aŭ tro mono-

tonaj, alie la publiko ne sufiĉe „mordus“; tial flankaj iom spicu ilin kaj tiel komenciĝas la raportaĵo... Pro tiu agmaniero la publiko lernis interesiĝi pli pri la artisto ol la artaĵo kaj tiu intereso nun fariĝas unualoke: scivolo. La granda homa leĝo tekstas: ke ĉie kaj en ĉio la homo serĉas sin mem; nun la publiko lernis serĉi la homon malantaŭ la artaĵo kaj tute interesiĝis pri la homo.

La spicisto demandas al si:

— Kiom diferencas ja sinjoro kiu verkas versojn kaj iu kiu uzas la paperon de verskolekto kiel saketojn? Kaj en kio tiu homo diferencas de alia? La raportisto rakontos tion al la homoj. La literatura raportisto estas la peranto inter la artisto kaj la publiko — la viro kiu profesias tion, kiu ekiras — mi ne diros: kiel blekganta leono, serĉanta kiun disŝiri, sed tamen: iom kiel ĉasisto serĉanta viktimon...

En la persono de dece vestita junulo, plej ofte, la raportisto eniras ĉe la artisto, faras la kutimajn klinojn, ekuzas sin pro la maldiskreta invado, kion li provas pardonigi per la interesiĝo kiun li montras por via arto kaj la arto generale. Li evitas klarigi la veran kialon de la vizito — li nur iom babilas, babilas ja senĉese; ne timu ke necesos unu vorto de vi! Li ekadmiras vian ĉirkaŭaĵon, la bildojn sur la muro, la librojn sur la tablo, vian personon, vian edzinon kaj viajn infanojn, la legomojn kaj la arbojn en via ĝardeno, vian vilaĝon kaj la vilaĝanojn, vian bovon, vian azenon, unuvorte ĉion kio apartenas al vi. Sed li precipe admiras vian laboron, kion vi faris, kion vi faras, kion vi faros. Li asertas al vi ne estas sufiĉe estimata, ke via laboro ne estas sufiĉe konata, ke via geniaj inklinoj ne estas laŭvalore taksataj, ktp.

Incidente la aminda babilulo singarde, kaj pro nura scivolo, tiam kaj tiam metas demandeton, kiun vi ja tre senkulpe respondas, ne suspektante ajnan malbonon. Post tio la vizitanto estas kontenta kaj plej ĝentile adiaŭas.

Vi ree eklaboras, kvazaŭ nenio estus okazinta. Sed nu? Kelkajn tagojn poste vi, artisto, ricevas revuon, vi havas en ĝi vian portreton, la portreton de via domo, de via ĉambro, ktp. Vi ne trovas en ĝi la raportiston, sed vin mem babilanta, sed ja babilanta pri ĉio kaj la cetero. Vi verdiktas kun la tono de pacjuĝisto pri viaj proksimuloj, klarigas viajn konceptojn pri ĉio ekzistanta en la artmondo; diras kiun vi amas kaj kiun vi ne povas suferi; sub la formo de promesoj vi disvolvas ĉiujn planojn kiujn vi portas en la korpo kaj ĉiujn majstroverkojn, kiujn vi donacos al la posteularo.

Klarigata estas via tuta vivmaniero,

kaj por Dio kaj ĉiuj homoj estas nun konate: kiam vi en- kaj ellitiĝas, kiom da fojoj vi manĝas, kiom da pipoj vi fumas, ĉu vi jes aŭ ja ne portas veŝtojn kaj kolumojn; kaj, supleme, vi nun scias kiel vi konduku al la publiko por esti vi mem kaj simili vin mem! Krome estas menciita la bona konsilo: kion vi estus devinta fari kaj kio mankas al vi por esti vera, kompleta geniulo — ĉi tio estas la nuraj saleroj kiuj amarigas la pladon, senpage servitan al vi. Vi cetere povas akcepti tion kiel vi volas, neniu demandas al vi pri tio! Ĉefe: estas kontentigitaj kaj la publiko kaj la scivolo.

El tio ne konkludu ke tiuj novaj moroj, tiu nova maniero estas kondamnendaĵo — cetere malmulte utilus; — tio fariĝis neevitebla neceso, al kiu la artisto submetiĝu.

La scivolo de la publiko por la artisto povas kaj do devas esti interesiĝon por la produkto, — la arto. Cetere estas artistoj al kiuj malgravas la forlaso de ilia rifuĝejo kaj kiuj bonvole aŭ kun plaĉo akceptas tiun enketon kaj volonte kunlaboras en tiu ekspozicio. Ja vanus enŝlosi sin; oni ne naĝas kontraŭ la fluo. Kaj la pruvo: ja ankaŭ mi mem lasis min konvinki ke mi rakontu: kiel oni fariĝas verkisto.

(Fragmento de „Kiel oni fariĝas verkisto“. El la jus aperinta volumo IX de lia kompleta verkaro p. 9-13).

## Al la Sekciaj Estraroj de LEEN

La direktoro de la Oficejo „Esperanto ĉe la Instruado“, S-ro C. B. Zonderdan, dissendis al ĉiuj seminarioj tre bonan kaj belaspektan broŝuron pri Esperanto pro la fakto ke laŭ la leĝa decido 1953 ekde Septembro 1954 specialaj fakoj en la seminarioj povas esti instruataj, se tiuj fakoj havas valoron por la instruado en elementaj lernejoj.

Laŭ nia opinio Esperanto certe havas valoron por tiu celo kaj tial ni urĝe petas niajn sekciajn estrarojn en urboj kie troviĝas seminario, kontakti kiel eble plej baldaŭ kun la direktoro de tiu instituto por preparoli ĉi tiun aferon. La tempo urĝas ĉar la nunjara instrukurso jam post kelkaj monatoj finiĝos kaj komenciĝos la somera ferio.

La broŝuro enhavas favorajn opiniojn pri Esperanto de Lia ekselencan moŝto D-ro W. Drees kaj de kelkaj inspektoroj ĉe la instruado inter kiuj estas ankaŭ la ĉefinspektoro pri la instruado en seminarioj S-ro C. Kleywegt. Krome estas al la broŝuro aldona la Raporto pri Esperanto de Prof. D-ro I. Lapenna.

Kaptu ĉi tiun okazon!!

## NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris post n-roj 165/166: s-ro P. H. Mooij, Bruselo, por V.E.B.; kaj por L.E.E.N.: s-ro P. A. v. Boven el Rotterdam.

### SOLVOJ.

167. pupil; okul; suker; tuber; satan; ulan; fazan; etager; retin; ordin; vesper; eman; nomad; altan; societ; paper; riper; omar; sonet; parter; ekzemplar; ripet; ovul. Post sufero venas prospero.

168. *Hor.*: vind, or, loti, prav, rem, alte, ski, for, ist, bel, bu, art, er, etulin, re, lip, etul, dir, flug, il, help, maskobal, kupra, akord, inversig, pulio, kling.

*Vert.*: varb, elf, kep, bril, nimfe, pum-pil, ole, garni, par, te, savo, orl, butik, rat, ululo, vei, il, bask, san, hakil, ojstr, delogi, tril, inic, erp, dig.

### 169. KUNMETU

el la 72 subaj litergrupoj: 24 nau-literojn vortojn laŭ jenaj klarigoj. Iliaj triaj literoj, samorde legataj, formas proverbon.

Klarigoj: 1. tute elementa; 2. li multe studis; 3. muzikilo; 4. kromvirino; 5. kaŭzi ŝvelon kaj doloron en organo; 6. li plenumas nenian oficialan rolon; 7. en kontraŭa pozicio; 8. desegno en teksto; 9. ŝercrompi; 10. igi korpon kapabla produkti elektrajn fenomenojn; 11. ĝi altiras turistojn; 12. li ŝatas danĝeran entreprenon; 13. oft viziti; 14. iu malsanulejo; 15. fari ion denove bonstata; 16. varmigebla halo, kie oni konservas delikatajn arbojn; 17. sufokpremi; 18. ordoni, ke malsanulo uzu iun medikamenton; 19. ĉirkaŭanta frazo, kiu donas al difinitiva vorto ĝian precizan difinon; 20. intermite ĵeti lumbrilojn; 21. li restas ĉe propra opinio, malgraŭ kontraŭaj admonoj; 22. aĉetantoj; 23. ies maniero prijuĝi; 24. meti (sian fingron) en flamon.

Litergrupoj: 1 ajo, 2 ajo, 3 ako, 4 alv, 5 ang, 6 aro, 7 ato, 8 bru, 9 ele, 10 enc, 11 ent, 12 fre, 13 ibi, 14 ide, 15 igi, 16 igi, 17 iki, 18 ili, 19 ilu, 20 ime, 21 ind, 22 inf, 23 ino, 24 izi, 25 kem, 26 kli, 27 kon, 28 kto, 29 ktr, 30 kub, 31 kun, 32 kve, 33 lam, 34 lvu, 35 mbr, 36 mis, 37 ndi, 38 nĝe, 39 nta, 40 nti, 41 obs, 42 oli, 43 ono, 44 ora, 45 pre, 46 pri, 47 pun, 48 rdi, 49 ref, 50 reŝ, 51 rio, 52 rio,

53 ris, 54 rud, 55 san, 56 sci, 57 skr, 58 sto, 59 str, 60 str, 61 tek, 62 tif, 63 tin, 64 tre, 65 ulo, 66 ulo, 67 ulo, 68 ulo, 69 vat, 70 vid, 71 vid, 72 vid.

### 170. KRUCVORTENIGMO.

*Horizontale.* 1. sola en sia speco(R). 3. detruo la vivon per malutila substanco(R); ĝi estas uzata por fari tegmentojn(R). 4. ideala modelo(R). 5. juna servisto en hoteloj; deklari ion bona(R). 6. amiko saluto(R). 8. pretigi pafilon(R); du voĉoj aŭdigantaj samtempe saman noton(R). 10. desegnajeto por ornamo libron(R); mezuri la profundecon(R).

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
2	□	■	□	□	□	■	□	□	□	□	□
3	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
4	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
5	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
6	□	■	□	□	□	□	□	□	□	□	□
7	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
8	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
9	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
10	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
11	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□

*Vertikale.* 1. sin movi persipe. 2. sanĝigi laŭ la cirkonstancoj. 3. formanĝi(R). 4. perdi(R). 5. parto de la vizaĝo(R). 6. kun kondiĉo redoni post difinitiva tempo. 7. propriĝi al si, kaŭzante al aliaj malutilon(R). 8. membrano kovranta ostojn(R). 9. eniĝi en staton de fortorefrēŝiga ripozo(R). 10. ilo por fendi lignaĵon. 11. povanta patologie difektiĝi(R).

La solvojn sendu la nederlandanoj al s-ro G. J. Teunissen, Burg, Tellegenstr. 21 hs, Amsterdam-Z.; kaj Flandra Ligo al s-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ 20/V/1954.

gramo kaj aliaj sciigoj al la Loka Kongres-Komitato (s-ino Klara Schmiedeburg, Renthof 9, Marburg/Lahn, Germanuj). Eksterlandanoj ne pagos Kongreskotizon. Loĝejo (je modera prezo) devas esti mendota plejeble baldaŭ, ĉar Marburg estas frekventata pentekosta vojaĝ-celo. Ankaŭ malmultekosta amasloĝejo estas je dispono, se eble gastigo ĉe esperantistoj.

## EL LA NEDERLANDA POEZIO

### LA BULVARDULO

GEERTEN GOSSAERT (\*)

*Samkiel la leono, naskita en sklaveco,  
Ja ne forgesas pri la devena vera stat',  
Sed ĉiam mezuradas, - revata libereco -  
Malvaston de la kaĝo en nerva promenad'.*

*Santiel pri neniam perdita la Edeno,  
Li revas, en la kaĝo de la volupt', dolor',  
Eluzas sur cemento de l'monda urb-areno  
L'elaston de l'piedo, la puron de la kor'.*

*Sed kiam rododendroj repompas en la  
skvaroj,  
Ho foje nekonscie devigas lin komand'  
Ekrompi l'urban sorĉon kaj tra  
l'mizer-kvartaloj  
Li nostalgie fuĝas al la printempo-land'.*

*Li ne returnrigardas, timante la ripozon,  
Rapidas tra herbejoj, arbaroj pro ĉi pe'l,  
Kvazaŭ kastel-perdinto fuĝanta furiozon,  
Atenta pri la mejloj post si, sed ne pri cel'.*

*Sed kiam vesperiĝas kaj sub la altaj arboj  
El stranga arbeto leviĝas la nebul',  
Rimarkas turpinteton, tutnigran sur  
or-farboj,  
montrantan al ĉielo, avide la okul'.*

*Kaj li rapide sekvas vojsulkon tra  
l'senhoma  
Kamparo, ĝis resonas paŝ' lia sur pavim',  
Kie kampula laca ĉe l'propra pordo doma,  
Afable lin salutas - vespera pi-esprim'.*

*Kaj vidas li kaŝita, de el preĝej-portalo,  
-Junuloj rindodancas sur la vilaĝa plac'-  
Leviĝi en ĉiela senbrile ora halo,  
Eburan printemplunon, senditon de la  
pac'.*

*Subite tra kulsvarmo ekŝvebas preter lia  
Okulo konfuzita el alto la hirund',  
Kiu elektis neston trankvilan en dom' dia  
Kaj malaperas nun en la vespera fund'...*

*Ho la flugiloj preskaŭ ektuŝis lian vangon,  
- La hasta, de l'feliĉo revita, flugil-bat'-  
Kaj manpugnige ĝemas li, lip-elmordas  
sangan,  
L'ungegon sentas de la sopir' kaj  
memkompat'.*

(trad. H. Vermuyten)

(\*) Prof. D-ro F. C. Gerritsen (1884) *El „Eksperimentoj“*

*Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-bond Postbus 100 — Mechelen en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. - Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned).*

### Germana Kongreso

Je Pentekosto, de 5a ĝis 8a de Junio, okazos en Marburg apud Lahn, en unu el la plej ravaj regionoj de Germanujo, la Germana Esperanto-Kongreso, je kiu ni kore invitas vin. La programo promesas kelkajn belajn tagojn en Esperantujo.

Partoprenontoj skribu pri detala pro-